# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ huhtikuu ◆ aprilo ◆ 2/2002



**Anna Ritamäki nova prezidanto de EAF, p. 3 & 5**

ESPERANTOLEHTI

## Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.
Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.
Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitus/Redaktion/Redaktejo**: 💻 esperantolehti@esperanto.fi
Päätoimittajaa etsitään, yhteydenotot puheenjohtajalle (Anna Ritamäki, yhteystiedot alla)
Ĉefredaktoro serĉata, kontaktu la prezidanton (Anna Ritamäki, kontaktinformoj sube)
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*
Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎🖷 (09) 530 1804 💻 ilkka.santtila@esperanto.fi

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 13,50 •/vuosi/år/jaro;
Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 •; Baltio 10 •, aliaj landoj 13,50 • .

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538
Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja:** *Anna Ritamäki*
Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 🖷 (02) 423 246 💻 anna.ritamaki@kolumbus.fi
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 💻 paivi.saarinen@iki.fi
**Sekretario/Sihteeri:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 💻 tiina.oittinen@pp.inet.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:**
*Anna-Liisa Heikkinen*, Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 💻 annaliisa.heikkinen@surfeu.fi
*Eila Martin*, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697
*Synnöve Mynttinen*, Koskenniskantie 5 D 39, 48400 Kotka. ☎ (05) 260 1326
*Jukka Noponen*, Viipurinkatu 27 A 12, 00520 Helsinki. ☎ (040) 5915767 ☎🖷 (09) 1483871 💻 jukka.noponen@iki.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet:**
*Irja Miettinen*, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta. ☎ (05) 453 0653 💻 irja.miettinen@WWnet.fi
*Raita Pyhälä*, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 💻 raitapy@jymy.kase.fi
*Eero Rinta-Karjanmaa*, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

**Kasisto/Rahastonhoitaja:** *Anna-Liisa Heikkinen*
Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 💻 eafkasisto@esperanto.fi
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

**Oficejo/Toimisto:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.
☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/aŭtomata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja:** *Heta Kesälä*
Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎🖷 (09) 275 5528
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

**Internet**: http://www.esperanto.fi

# Sur la privilegia vojo

Iam en 1986 mi komencis iri sur la privilegia vojo al lingvoscio. Mi konatiĝis kun la aventuroj de la kokidoj Keko kaj Riko. Ili lude instruis al mi esperanton ĉiam kiam mi havis la okazon dediĉi min al ili, kaj tion mi havis ofte. Ja estis ĉarme legi pri la bestetoj, sed ne nur tio inspiris min. Mi estis kaptita de la lingva ludo, de la enigmoj. Plaĉis al mi ekkompreni la vortojn helpe de la bildoj kaj helpe de la etaj klarigoj rande de la teksto.

”**Jen koko.** Jen **granda** koko. **La** koko **estas** granda.”

Tiuj, la unuaj, frazetoj de la lernolibro ”Privilegia vojo al lingvoscio” de Vilho Setälä estas konataj al multaj. Fojfoje oni povas renkonti personojn kiuj laŭte deklaras ”Keko kaj Riko estas du kokoj”. Evidente ili iam konatiĝis kun la sama lernolibro, ellernis la unuan paĝon, eble eĉ pliajn. Ili ne pluiris la privilegian vojon al lingvoscio, sed ili ekiretis ĝin – kaj ŝajne restis plaĉa rememoreto.

Dum Vintraj Tagoj de EAF en Mikkeli la 23an kaj 24an de marto tiu sama libro partoprenis la libroekzpozicion kun la ŝatataj libroj de la partoprenantoj. Tiu ekzemplero jam enhavis tri nomojn de antaŭaj posedantoj.

Mian lernolibron mi aĉetis en la Akademia librovendejo en Turkuo. Tiutempe ĝi estis tie trovebla, same kiel la vortaro. Kun la familo Koko mi pasigis la someron post la fino de mia dua gimnazia jaro. Mi preparis min por interŝanĝstuda jaro en Aŭstralio. Antaŭ mia foriro mi partoprenis ankaŭ daŭrigan esperantokurson en Hanko/Hangö kaj manĝis ĉinecan manĝaĵon ĉe la familio Hansen dum la tiutempe tradiciaj Someraj Tagoj de FEJO.

Do, ĉu mi ekaktivis en Aŭstralio? Ne, tie mi ankoraŭ ne estis vere kaptita de la homoj en Esperantujo. Mi nur ricevis unu leteron de Melburno kaj renkontis maljunan komencantinon en iu pli norda urbeto en Viktorio. Reveninte en Finnlando, jam maltrafinte la jubileajn aranĝojn, en 1987 mi renkontis vere internacian grupon da esperantistoj. Ho, kiom mi surpriziĝis. Tiuj homoj, inter kiuj ankaŭ Osmo Buller, Sakari Kauppinen, Mark Fettes, Humphrey Tonkin kaj Barbara Despiney parolis la lingvon de Keko kaj Riko kvazaŭ ĝi ne estus ludlingvo, kvazaŭ eblus per ĝi komuniki tute normale. Nu, eblas, sed por mi tio sentiĝis simpla miraklo, kaj nun mi vere eksentis min privilegiita lingvolernanto!

Nepre mi devas lerni pli, mi konstatis, kaj veninte hejmen ”Jen nia mondo” iĝis mia konstanta ĉambra amiko. La kasedo sonadis: ”Ĉu plaĉus al vi kafo?” Tamen, mi ne forgesis pri la aventuremaj bestetoj, sed ili ne estis facile sekveblaj post la unuaj dek ĉapitroj. Ĉe la ĉapitro 25 pri la kaŝludo mi jam preskaŭ rezignis. ”Kio do okazis? La kokoj jam **enuas** atendi, kaj eliras por **spiri** libere. Kaj nun Keko kaj Riko ekserĉas Poĉjon.” Tio estis en ordo, eĉ la sekvaĉapitran pigon mi

# Ĉefredaktoro serĉata

La posteno kiel ĉefredaktoro de Esperantolehti (Esperanta Finnlando, Esperantobladet) estas vaka. Esperanto-Asocio de Finnlando dankas al Aimo Rantanen pro sia multjara engaĝiĝo kiel ĉefredaktoro kaj aparte estimas lian pretecon resti kunlaboranto.

Atentu!

- Eble ni serĉas ĝuste vin.
- Vi ne devos labori sola.

Tapio Sormunen pretas daŭre prizorgi la adresregistron kaj Pentti Makkonen la presadon kaj distribuadon de la gazeto. Ankaŭ Ilkka Santtila pretas pluprizorgi la enpaĝigon. Ekzistas redakta grupo kiu helpas pri la eltrovo de bonaj temoj kaj pri verkado de tekstoj. Simple mankas kunordiganto kun vizio pri la evoluo de la gazeto, iu kiu pretas okupiĝi pri la intelekta kaj praktika kunordigo de la jama stabo.

La ĉefredaktoro bone scipovu Esperanton. Rimarku ankaŭ ke kontrollegada subteno certe estos aranĝebla kiam ni trovis la ĝustan personon por gvidi nian redaktan laboron. Aliro al interreto estas necesa por bone plenumi la taskon.

Se vi interesiĝas bv. kontakti la novan prezidanton de EAF Anna Ritamäki (kontaktinformoj sur p. 2). Eĉ se vi havas dubojn ne hezitu esprimi viajn ideojn!

Ni petas vian helpon. Nia organo vere bezonas kunordiganton.

*Anna Ritamäki*
*Prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando*
*Ano de la redakta grupo*

eltenis, sed ho, kiam la du kokidoj devis iri aĉeti terpomojn la tuto iĝis iom tro komplika: ”La **terpomoj** el la propra kampeto de la kokoj jam antaŭ kelka tempo finiĝis, kaj jam **tedis** la fratojn vivi longe sen la prefer**ata** ĉiutaga manĝaĵo.”

Nun tio ĉi ŝajnas al mi normalaĵo, tute ne malfacila teksto. Mi legas flue librojn, revuojn, eĉ verkis jam multajn raportojn en Esperanto. Strange. Mi ne plu estas komencanto. En la jarkunsido de Esperanto-Asocio de Finnlando mi elektiĝis eĉ prezidanto!

Reveninte hejmen de Mikkeli mi pensis: Kara Keko kaj Riko, mi volas sekvi vin ĝis la fino. Nepre tiom progresinta persono kiel la prezidanto de EAF devus koni la tutan rakonton. Mi legis pri pingloarboj kaj pri troa ŝparemo kaj fine ankaŭ pri la vulpo kiu prunteprenis libron: “De pruntita libro jen la **nepra** (neevitebla) sorto: ofte ĝi perdiĝas, ĉiam difektiĝas.” Tiel finiĝis la privilegia vojo al lingvoscio, aŭ, kiel mi volas kredi, finiĝis nur la komenco de la vojo. Ja estas privilegie pluiri tiun ĉi vojon kun vi, karaj anoj de Esperanto-Asocio de Finnlando!

*Anna Margareta Ritamäki*

# Vintraj tagoj kun literaturo, opero kaj nova estraro

La Vintraj tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando okazis en Mikkeli la 23.-24.3. 2002. La aranĝo havis ĉ. 50 partoprenantojn, inter ili tri el Estonio kaj unu el Slovakio.

La temo de la Vintraj tagoj estis literaturo. Aleksander Korĵenkov, eldonisto el Kaliningrad, Rusio, traktis la temon multflanke en siaj prelegoj 'Pri la Esperanta literaturo', 'Dek jaroj de profesia vivo en Esperantujo' kaj 'Gaston Waringhien 100 jaroj'. La stelo de la vespera programo estis sopranulino Liisa Viinanen, kiu prezentis unuvirinan operon 'Duraj Sortoj Napolaj' akompanita de pianisto Hanna-Leena Kalaoja.



*Jukka Laaksonen donis prezidantan martelon al Anna Ritamäki. (foto: Pentti Makkonen)*

Dimanĉe 24.3. okazis la jarkunveno de la asocio. La jarkunveno elektis Anna Ritamäki el Kimito kiel novan prezidanton kaj dankis Jukka Laaksonen pro lia multjara laboro en la estraro, kiel prezidanto kaj en aliaj taskoj. En la estraron de la asocio elektiĝis Eila Martin (Oulu), Synnöve Mynttinen (Kotka), Jukka Noponen (Helsinki) kaj Päivi Saarinen (Espoo) kiel membroj kaj Irja Miettinen (Lappeenranta), Raita Pyhälä (Lestijärvi) kaj Eero Rinta-Karjanmaa (Lahti) kiel vicmembroj. Sen reelekto en la estraro restis Anna-Liisa Heikkinen (Helsinki) kaj Tiina Oittinen (Turku).

Aini Vääräniemi estis nomumita Aganto de la jaro 2001 pro sia laboro por Esperanto en Taivalkoski kaj pro la internacia fabelkonkurso.

Fine la partoprenantoj de Taivalkoski invitis al la sekvaj Aŭtunaj tagoj. La datoj verŝajne estos 21.-22.9.2002.

Post Vintraj tagoj Aleksander Korĵenkov vizitis la bienon Esperarto en Orimattila, esperantistojn en Lahti, Rauma kaj Turku kaj fine ankaŭ la oficejon en Helsinki. En Rauma li prezentis publikan prelegon kiel gasto de la loka biblioteko.

# Kirjallisuutta, oopperaa ja uusi hallitus

Suomen Esperantoliiton talvipäivät pidettiin Mikkelissä 23.-24.3.2002. Tilaisuudessa oli noin 50 osanottajaa, mukaan lukien kolme Virosta ja yksi Slovakiasta.

Talvipäivien teema oli kirjallisuus. Aleksander Korĵenkov, kustantaja Kaliningradista, Venäjältä, käsitteli teemaa monipuolisesti esitelmissään 'Esperantokirjallisuudesta', 'Kymmenen vuotta Esperanton ammattilaisena' ja 'Gaston Waringhien 100 vuotta'. Iltaohjelman tähti oli sopraano Liisa Viinanen, joka esitti yhden naisen oopperan 'Kovia napolilaiskohtaloita', säestäjänään pianisti Hanna-Leena Kalaoja.

Sunnuntaina 24.3. pidettiin liiton vuosikokous. Kokouksessa liiton uudeksi puheenjohtajaksi valittiin Anna Ritamäki Kemiöstä. Kokous myös kiitti entistä puheenjohtajaa Jukka Laaksosta monivuotisen esperantotyön johdosta. Hallituksen jäseniksi valittiin Eila Martin (Oulu), Synnöve Mynttinen (Kotka), Jukka Noponen (Helsinki) ja Päivi Saarinen (Espoo) ja varajäseniksi Irja Miettinen (Lappeenranta), Raita Pyhälä (Lestijärvi) ja Eero Rinta-Karjanmaa (Lahti). Lisäksi hallituksessa ovat Anna-Liisa Heikkinen (Helsinki) ja Tiina Oittinen (Turku), jotka eivät olleet erovuorossa.

Aini Vääräniemi palkittiin toiminnastaan Taivalkoskella ja kansainvälisestä satukilpailusta Aganto de la jaro 2002 -palkinnolla.

Talvipäivien päätteeksi osanottajat Taivalkoskelta kutsuivat seuraaville syyspäiville, jotka todennäköisesti pidetään 21.-22.9. 2002.

Talvipäivien jälkeen Aleksander Korĵenkov vieraili Esperarto-tilalla Orimattilassa ja esperantistien luona Lahdessa, Raumalla ja Turussa sekä liiton toimistossa Helsingissä. Raumalla hän piti yleisöluennon paikallisen kirjaston vieraana.



*EAF:n uusi hallitus piti järjestäytymiskokouksen. (kuva: Pentti Makkonen)*

# Euroscola en Esperanto

La 19an de marto inter la preskaŭ 400 partoprenantoj de Euroscola en Strasburgo estis ankaŭ tridek kvin lernantoj de Esperantujo. Ili venis oficiale de Finnlando, Francio, Hungario kaj Kroatio. En la finna grupo tamen estis ankaŭ svedo kaj tri rusinoj. Kiel vojaĝgvidantoj partoprenis Carola Antskog de Kimito kaj Svetlana Ejst de Sankt-Peterburgo.

Dum la vojaĝo la finna grupo turistis unu tagon en Parizo antaŭ la foriro al Strasburgo. Lunde la 18an de marto la junaj parlamentanoj preparis sin por bone prezenti la ideon de lingva egaleco dum la laboro en la kunveno. Estis ankaŭ tempo por distra programo.

Kompare al la speciala Euroscolatago la 8a de majo 2001 la lingva situacio nun estis diskriminacia por ĉiuj malgrandaj lingvoj. Estis traduko nur de kaj al grandaj lingvoj kaj tiel nek esperanto nek la finna aŭ sveda estis permesitaj por la parolantoj. Ni antaŭe kredis ke ĉiujn lingvojn oni rajtus paroli kaj estis granda elreviĝo por ni instruistoj kiam ni rimarkis ke la gelernantoj el ĉiuj landoj parolis nur en la grandaj lingvoj. La sola esperanta vorto en la prezentado de la Esperanto-grupo estis Saluton!

Dum la diskutado en la granda salono unu knabino demandis pri la ebleco adopti esperanton kiel laborlingvon. La respondo estis ke tiaj planoj ne nun estas aktualaj en la Eŭropa Unio. Post lunĉo la junuloj en laborgrupoj diskutis pri homaj rajtoj, la loko de Eŭropo en la mondo kaj aliaj temoj. En almenaŭ tri el la kvin raportoj la esperanta influo estis rimarkebla.

Pri la principoj de la lingvouzo en la parlamento diskutis la instruistoj en propra laborgrupo. Ni eksciis ke en vera parlamenta kunsido ĉiuj parolas sian propran lingvon kaj ricevas tradukon, sed por la junaj parlamentanoj en Euroscola oni uzas nur kelkajn lingvojn laŭ la scioj pri tio, kiujn lingvojn oni instruas plej multe en la lernejoj en EU-landoj. Havi tradukon de kaj al ĉiuj lingvoj oni konsideras tro multekosta.

Kiel tuto ni estis kontentaj kun nia vizito al Strasburgo. Por realigi la partoprenon ni bezonis monon, kiun ni ricevis de Fondumo Esperanto kaj por ties subvencio ni dankegas.

Mi esperas ke Finnlando ankaŭ venontjare povas sendi grupeton al Euroscola. En la sekvonta numero kelkaj partoprenantoj rakontos pri siaj spertoj en la finna lingvo kaj tiam ni ankaŭ informos pri la kondiĉoj por partopreno en Euroscola 2003.

*Carola Antskog, gvidanto de grupeto Finnlando kun gastoj*



***Dum la kunsido la junaj parlamentanoj ankaŭ voĉdonis pri aktualaj demandoj, kiuj legeblis en kajero en ĉiuj oficialaj lingvoj. Al la lasta demando "Ĉu vi sentas vin eŭropa civitano?" 190 junuloj respondis jes, 133 ne kaj 48 sindetenis.***

# Tutmonda fabelkonkurso invitas infanojn verki

Päätalo-Instituto estas kultura-literatura edukcentro en Taivalkoski, Norda Finnlando. Ĝi estas nomita laŭ Kalle Päätalo, eminenta verkisto, kiu naskiĝis en Taivalkoski. Inter la agadoj de la Instituto estas fabelkonkurso por finnaj infanoj, kiu okazas ĉiujare ekde 1994.

En 2000 la Instituto eksperimente aldonis al la konkurso Esperantlingvan branĉon laŭ iniciato de la Vilaĝa Asocio de Metsäkylä, unu el la vilaĝoj en la komunumo Taivalkoski. Pro bonaj spertoj ĝi estis ripetita en 2001, kiam UEA aŭspiciis ĝin kaj donacis libropremiojn al la gajnintoj. En ambaŭ fojoj finnaj gazetoj multe raportis pri la Esperanta branĉo.

Ankaŭ ĉi-jare la konkurso havas Esperanto-branĉon, kiu denove okazas sub aŭspicioj de UEA. Rajtas partopreni infanoj el la tuta mondo, kiuj scipovas aŭ ankoraŭ studas Esperanton.

En la konkurso estas tri kategorioj: A: infanoj ĝis 9-jaraj; B: 10-11-jaraj; C: 12-14 jaraj. La konkursaĵoj povas esti verkitaj de individuaj infanoj aŭ de grupoj (ekz. lernejaj klasoj). Individuaj kaj grupaj konkursaĵoj estos taksitaj aparte. La longeco de la konkursaĵoj ne estas fiksita. La ĵurio aprezas la fabelecon kaj originalecon de la verkaĵo. En la skribado aŭ tajpado plenkreskulo rajtas helpi laŭ sia konscienco.

La ĉefa celo de la konkurso estas, ke geknaboj interesiĝu pri la uzado de la lernita lingvo, daŭrigu sian bonan hobion kaj ekzercu sian kreivon.

La konkursaĵoj devos atingi la organizanton plej laste la 20-an de septembro 2002. Oni adresu ilin al:

Päätalo-Instituto
PL 39
FI-93401 Taivalkoski
Finnlando

Oni skribu sur la koverto la vorton ”Fabelkonkurso”. Oni uzu pseŭdonimon kaj menciu, ĉu la konkursanto estas grupo aŭ unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso de la konkursanto estu en aparta koverto.

Pli da informoj oni povas ricevi de la komisiito de la Instituto pri la konkurso:

Aini Vääräniemi
Vääräjärventie 26 A
FI-93590 Vanhala
Finnlando
(rete: *aini.vaaraniemi@pp.inet.fi*)

La hejmpaĝo de la Instituto estas <*www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti*> kaj ĝia retadreso estas <*instituutti@taivalkoski.fi*>. Pri la fabelkonkurso bv. tamen korespondi nur kun la komisiito (vd. supre). La direktoro de la Instituto estas Osmo Buller.

# Seminario por instruistoj en Valamo

Post la kurso en Valamo komence de julio okazos Instruista seminario de ELFI (Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj). La seminario komenciĝas la 5an de julio je 17.30. Tiam ni konatiĝos kun nia ĉefa gvidanto tra la seminario, Atilio Orellana Rojas, kiu ankaŭ instruas la progresantojn dum la kurso 1-5.7.

Dum la seminario ni lernos pri kelkaj metodoj por instrui lingvojn ĝenerale kaj kiel oni instruas laŭ tiuj metodoj. La pritraktotaj metodoj estas gramatika, pririgarda, rekta, dumdorma, Freinet-pedagogio, sugestopedio, neŭrolingvistika programado kaj integra rapidlernado. Dum semajnfina seminario ni kompreneble ne havas tempon por ĉiujn metodjn profunde trakti, sed ni koncentriĝos al tri ĝis kvar.

Sendepende de metodo gravas ke la instruado estas varia kaj amuza. Ni lernos bonajn ludojn kaj kantojn, konatiĝos kun lernolibroj kaj vidbendoj, diskutos kiel oni plej bone utiligas la vortarojn kaj produktas instrumaterialon. Eble ni eĉ faros teatraĵeton. Ni vidos en la praktiko, kiel funkcias ĉi tiu kaj jena metodo. Ni povos diskuti pri la prezentado kaj ĉefe oni povos mem sperti kiel lerni/instrui laŭ diversaj metodoj.

Por memstudado Atilio rekomendas "La ĉefaj principoj de fremdlingva instruado" de Aleksandro MELNIKOV kaj "Metodiko de la Esperanto-instruado" de Rudolf RAKUŜA. Eblas prunti ilin de ELFI.

La kostoj por la kurso estas 131, 140 aŭ 156 eŭroj depende de la loĝkondiĉoj. La plej favora estas unupersona ĉambro en la gastdometo. La aliaj estas por du- aŭ unulita ĉambro en la loĝejo. La prezoj inkluzivas ĉiujn kostojn. Se vi volas resti nokton post la seminario tio eblas.

Al la seminario oni aliĝas rekte al Valamon kansanopisto, 79860 Uusi-Valamo, tel (017) 570 1400, fakso (017) 5701 402, e-poŝto <*opisto@valamo.fi*>. Informojn pri la seminario donas ankaŭ Carola Antskog kaj Tiina Oittinen, kontaktinformoj troviĝas sur la kovrilpaĝoj.

Bonvenon al seminario!

*Carola Antskog, prezidanto de ELFI*

## Jouko Lindstedt nova prezidanto de Fondumo Esperanto-säätiö

Jouko Lindstedt estis elektita kiel la nova prezidanto de Fondumo Esperanto-säätiö (FES) en ties estrara kunsido pasintan decembron. La ĝisnuna prezidanto Harri Laine iĝis vicprezidanto. La ceteraj estraranoj estas Jukka Keitele, Jarkko Laine kaj Simo Raumavirta.

FES, kies bazan kapitalon donacis Vilho Setälä en 1955, estas sendependa fondaĵo sub la kontrolo de la ministrejo pri justico. Ĝia celo estas subteni per subvencioj kaj stipendioj projektojn, kiuj diskonigas Esperanton en Finnlando, progresigas ĝian instruadon aŭ praktike utiligas ĝin. FES subvenciis interalie Kulturan Esperanto-Festivalon en Helsinko en 2000 kaj la Euroscola-projekton de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj.

La nova adreso de FES estas ĉe la prezidanto: Jouko Lindstedt, Heinlammintie 16 B, 15210 Lahti. Retpoŝte: <*jouko.lindstedt @helsinki.fi*>

# Internacia Somera Kurso en Esperantogården

Esperanto-Gården ĉi-jare organizos la 17an Internacian Someran Kurson en Lesjöfors. Ĝi okazos 24-29 junio kaj por tiuj kiuj deziras daŭrigi la kunestadon kaj helpi pri la prizorgado de la ejo eblas resti du pliajn semajnojn kiel ano de internacia laborbrigado. Jam la duan fojon tion ebligas Esperanto-Gården kunlabore kun la volontula organizaĵo SCI.

Esperanto-Gården estas kursejo kaj gastigejo kiu situas meze inter Stokholmo kaj Oslo, en okcidenta Svedio. Ĝin posedas internacia kooperativo de esperantistoj. Ĝi ankaŭ funkcias kiel migrula hejmo aŭ junulargastejo kunlabore kun la Sveda Turisma Asocio (STF) kaj la internacia IYHF/HI. Ĝi ankaŭ havas restoracion kaj bonvenigas kursojn de ĉiuj specoj.

Ni invitas al semajnaj Esperantokursoj diversnivelaj – komencanta, progresanta, kaj konversacia. Ni ankaŭ havos kombinan komencant- kaj metodkurson por instruistoj – se la nombro da aliĝantoj sufiĉos. Gefiloj kaj genepoj estas bonvenaj al la infana grupo, kie oni lernas per desegnado, ludado kaj kantado.

Instruado 6 lecionojn ĉiutage kun svedaj kaj eksterlandaj instruistoj. Ankaŭ en la komenca kurso la parolata lingvo estos en la centro laŭ rekta metodo kaj studmaterialo ellaborita en la Esperanto-fako de Karlskoga Popola Altlernejo.

Je la vespera kaftrinkado ni inter alie informos pri la Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝia ideo (ni interpretos por novuloj en la lingvo), montros lumbildojn, videojn kaj librojn, rakontos pri vojaĝoj. Kompreneble ni ofte kantos en Esperanto. Ne forgesu kunporti muzikinstrumenton, lumbildojn aŭ aliaĵojn por simpla distrado.

Eblecoj partopreni en ekskursoj kaj liberaeraj aktivecoj.

Vi povas elekti diverskostan loĝadon: unu- aŭ dulitan ĉambron, multlitan ĉambron aŭ amasloĝadon. Vi ankaŭ povas dormi en propra tendo aŭ en ruldomo. Ni manĝos kune en la kursmanĝejo. Belaj ĉirkaŭaĵoj. Promena distanco al vendejoj. Kvar km al bela liberaera banejo.

Karlskoga Popola Altlernejo jam farigis konata, internacia Esperanto-centro pere de la tutsemestraj kursoj de la Esperantofako. Ĉi tien oni ankaŭ lokis Internacian Junularan Kongreson.

Antaŭe ni aranĝis la somerajn kursojn en la Popola Altlernejo kaj ni tre ĝojas, ke ni nun povas loki ilin en Esperanto-Gården en Lesjöfors.

Bonvenon al belega regiono kaj riĉiga somera kurso kun gaja etoso kaj afablaj homoj el diversaj landoj!

Jam partoprenis studantoj de kvardeko da nacioj en la instruado.

Kurstempo: 24–29 junio (ebleco resti du pliajn semajnojn por internacia laborbrigado, sed bv. antaŭanonci vian deziron partopreni la laborbrigadon. Partoprenantoj en la laborbrigado manĝas laj loĝas en amasloĝejo senkoste.)

Kostoj: 1075–2490 (amasloĝejo–unulita ĉambro), infanoj ĝis 15 jaroj – duonpreze, krompagoj por ekskursoj.

Aliĝu ĝis la 31a de majo 2002.

Eksterlandanoj rajtas pagi surloke.

Esperanto-Gården, S-68096 Lesjöfors, Svedio. Tel: +46 (0)590-309 09, fakso: +46 (0)590-303 59. Ret-adreso: <*egarden@esperanto.se*>

# Profesiiĝu pri esperantologio studante ĉe UAM!

*Prezentiĝas eksterordinara ebleco studi universitatnivele esperantologion. Tiun eblecon ofertas universitato en Poznan, Pollando (vidu la subajn informojn).*

*Ĉiuj kiuj interesiĝas pri antaŭenigo de universitatnivela studado de Esperanto estas ankaŭ bonvenaj kontakti kun mi. Eble ni kadre de EAF povus komisioneton pri tiu temo.*

*A M Ritamäki*

Nuntempe, kiam Eŭropo unuiĝas kaj tutmondiĝo forigas barojn inter nacioj, la lingva problemo ankoraŭ akre manifestiĝas. La esperantistaro proponas sian kontribuon al la solvo: sendiskriminacian dialogon inter kulturoj. Por fariĝi serioza partnero, necesas havi profesiulojn, kiuj havas kapablojn, sciojn kaj diplomon por entrepreni la taskojn de instruistoj, tradukistoj aŭ interpretistoj. Ĉu ni rajtas postuli samajn rajtojn en lernejoj aŭ en internaciaj organizajoj sen havi similajn bazojn? Malfacile! UEA emfazas **profesiiĝon** kaj sekve la rolon de instruado en sia Strategia Plano kaj **universitata instruado** iĝis elstarigita celo de ILEI.

La Universitato de Adam Mickiewicz (UAM) en Poznan, la dua plej granda universitato en Pollando ofertas 3-jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko. La **internacia kurso** okazas en la Lingvistika Instituto, sub la gvido de d-rino Ilona Koutny, membro de la Akademio de Esperanto. Inter la prelegantoj estas elstaraj esperantologoj, kiel profesoroj John Wells, Humphrey Tonkin kaj Michel Duc Goninaz; doktoroj Vera Barandovska-Frank, Detlev Blanke, Zbigniew Galor, Katalin Kováts (Smideliusz) kaj Blazio Vaha; la poetino Lidia Ligêza kaj István Ertl.

La **Interlingvistikaj Studoj** donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio. Pro la metodika formado la Studoj ricevos specialan rolon en la instruista trejnado dum la sekva periodo.

Surloka kurso (unusemajna sesio) okazos unufoje dum la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro). La gestudentoj pretigos diplomlaboraĵon kaj post la fina ekzameno ricevos atestilon pri Interlingvistikaj Studoj. La unuaj gestudentoj (el Ĉeĥio, Germanio, Makedonio, Usono kaj Pollando) diplomiĝos ĉi-jare.

Partoprenontoj povas aliĝi el la tuta mondo por la studjaro 2002/2003 gis la **15-a de aŭgusto 2002**. Pli frua anonco estas bonvena.

Postuloj: fino de mezgrada lernejo (kun abiturienta ekzameno aŭ egalvalora) kaj bona scio de Esperanto. Partoprenontoj devas plenumi orientigan teston antaŭ la komenco de la Studoj. Kelkaj stipendioj estas antaŭvidataj.

Kotizo por unu semestro: 400 EUR (por nepagipovaj landoj ĉirkaŭ 120 EUR).

Por **pluaj informoj kaj aliĝilo** kontaktu d-rinon I. Koutny:

Lingvistika Instituto de UAM
ul. Miedzychodzka 3-5.
PL-60-371 Poznan
T: +48-61 829-27-09
F: +48-61 829-27-00 (sekretariejo) ▷

E: *ikoutny@amu.edu.pl*

La septembra sesio (23-27.09.2002) estas kunligita kun la semajnfina kultura renkontiĝo ARKONES, same en Poznan, kiu post la intensa tutsemajna serioza laboro ebligas malstreĉiĝon (kun teatraĵoj, muziko, diskutoj, ktp).

Se la studontoj bezonas lingvan perfektigon, ni pretas aranĝi **superanivelan intensan lingvokurson** (unusemajnan) antaŭ la septembra sesio kontraŭ kroma kotizo.

## Salutoj de la Murmanska klubo

Aleksas Masiukas informas ke la Murmanska Esperantoklubo la 25an de februaro solene festis sian 14an naskiĝdaton kaj finon de kurso.

"Bedaŭrinde ne ĉiuj atingis la finon, sed 6 atestojn mi enmanigis kaj esperas, ke tio estos novaj membroj de nia klubeto. Mi sendis retmesaĝon al finnaj E-kluboj petante la adresojn de korespondemuloj, sed dume neniu reeĥis. Ja niaj esperantistoj preferus ne iujn forajn (japanajn, ĉinajn, aŭstraliajn aŭ brazilajn), sed najbarajn amikojn."

**Jen ilia korespondpeto:**

La membroj de Murmanska E-klubo intencus havi amikojn inter la legantoj de Esperantolehti kaj precipe en la najbaraj, la plej proksimaj, landoj: Finnlando, Svedio kaj Norvegio. Informi nin pri la konsento ekkorespondi kun murmanskanoj eblas rete: <*masiukas@mail.ru*> aŭ paperpoŝte: Aleksas Masiukas, pr. Lenina 101-26 183012 Murmansk, Rusio. Mi transdonos la adresojn al la klubanoj.

## Esperantoliiton stipendejä haettavissa

Suomen Esperantoliitto ry (EAF) myöntää stipendejä ennen 1.5.2003 pidettäviin esperantotapahtumiin osallistumista varten. Stipendejä voi hakea kuka tahansa esperantosta kiinnostunut henkilö. Haku tapahtuu vapaamuotoisella kirjeellä jossa on mainittava hakijan yhteystiedot, mihin stipendiä haetaan ja haettava summa. Hakemuskirjeen kielenä voi olla suomi, ruotsi tai esperanto. Hakemus postitetaan Esperantoliiton toimistoon viimeistään ennen 15.5.2002.

Suomen Esperantoliitto/Stipendit
Siltasaarenkatu 15 C 65
00530 Helsinki

Lisätietoja liiton hallituksen jäseniltä.

Esperantoliitto pyrkii hakemuksia käsitellessään asettamaan etusijalle uudet esperantistit ja sellaiset henkilöt, joita ei aikaisemmin ole tuettu stipendeillä. Päätöksestä tiedotetaan hakijalle itselleen kirjeitse sekä myönnetyistä stipendeistä esperantolehdessä.

## Esperanto-klubo de Helsinki

9.4 (mardo) **vinvespero** je 18.00
Argentinaj vinoj kun Eeva. Antaŭanonco al <*evaijarvi@yahoo.com*>

23.4 (mardo) **mondmuzika vespero** je 18.00
Sakari prezentas afrikan muzikon.

7.5 (mardo) **kalevala-vespero** je 18.00
Gvidos Riitta.

1.6. (sabato) **printempa ekskurso** je 12.00 al Seurasaari kaj ferepoka vilaĝo en Pukkisaari. Gvidos Jukka Vaijärvi kaj Riitta Hämäläinen.

Pliaj informoj en niaj retpaĝoj:
<*www.esperanto.fi/helsinki*>

# Biblioteko – Novakiroj

En la oficejo de EAF estas deprunteblaj:

**Bibliografio:**
La okcidenta-orienta akrido. William P. Athis. Spokane 1987. 51 p.

Joel ja Suoma Vilkki aikalaistensa muistelemina. Kerava 2000. 34 s.

**Esperantaĵo:**
Aktoj de la Akademio II 1968-1974. Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto No. 10. Blackburn. 79 p.

Hamburgo en retrospektivo. Dokumentoj kaj materialoj pri la kontraŭneutraleca politika konspiro en UEA de prof. d-ro Ivo Lapenna. Saarbrücken 1975. 96 p.

La Revuo Internacia monata literatura gazeto. Volumo 1. Septembro 1906 – Aŭgusto 1907. 576 p.

**Poezio:** Elektitaj poemoj. Castro Alves. Rio de Janeiro. 1959. 184 p.

**Romano:** La Normandaj Rakontoj. Guy de Maupassant. Tradukis Rolan Dupuis. Tierp 1953. 210 p.

**Romano:** Memoraĵoj de eŭska bovino. Bernardo Atxaga. El la eŭska tradukis Aitor Arana. 184 p.

Tiu bovino, kiu volas esti vera, nepre konu la dezerton, malproksimiĝu de la mondo kaj pasigu longan tempon en tiu regno kun nur sablo. Meze de la sablejo, sen herbo kaj akvo, la bovino suferos. Kaj ofte, senkompate skurĝata de la suno, ŝi desiregos fuĝi kaj reiri al la stalo. Sed se ŝi volas esti vera bovino, ŝi ne kapitulacos; ŝi persiste antaŭeniros tra la dezerto ĝis ekvido de humidaj montoj kaj ombraj arbaroj.

## Novaĵoj de Steleto

La jarkunveno de Steleto okazis 22.2.2002. En la enkonduka parolado Raimo Tanskanen esprimis dankemon al Irma Heikkilä, kiu jam dum kelkdekaj jaroj libervole redaktis kaj laŭtlegis Sonrevuon. Ĝi peras gravajn informojn al blinduloj kaj sciigas pri la ĝenerala Esperanto-movado. Krom steletoanoj Sonrevuo estas aŭskultata ankaŭ en Bulgario, Estonio, Rusio kaj Ukrajnio. La kunveno forte aplaŭdante konsentis kun la dankoj. Koran dankon Irma!

La jarkunveno faris neniujn ŝanĝojn en la estraro. Tiel kiel prezidanto daŭrigas Raimo Tanskanen el Pomarkku, vice Heikki Kosonen el Helsinki, sekretario/kasisto estas Ritva Sabelli.

La brajla leterkurso estas havebla ĉe la gvidanto Raimo Tanskanen (Uudenkyläntie 827, 29630 Pomarkku). La prezo de 8 leteroj estas 20 • .

# FEJO

## Uusi vuosi, uudet kujeet

FEJO:n vuosikokous pidettiin 23.3.2002 Mikkelissä Suomen Nuoriso-opistolla.

Tänä vuonna FEJO:a luotsaa suurimmaksi osaksi tuttu joukko, mutta pari uuttakin kasvoa joukossa on. Vuosikokouksessa hallitukseen valittiin seuraavat henkilöt:

Patrik Austin, Porvoo (puheenjohtaja)
Pipsa Ahonen, Turku (varapuheenjohtaja)
Katja Lampinen, Helsinki (sihteeri)
Hanna Helén, Helsinki (hallituksen jäsen)
Mikko Mäkitalo, Turku (hallituksen jäsen)
Timo Pirinen, Hamari (hallituksen jäsen)

Hallituksen varajäseneksi valittiin Mikko Erkinaro Jyväskylästä ja kassanhoitajana jatkaa Eeva Vaijärvi Helsingistä.

## Oivallinen lääke kaikenlaisiin ihmiselon ongelmiin:

# FEJO™



”Ennen olin virkanainen ja painoin töitä kahdeksasta neljään...”



”...kunnes FEJO:ssa löysin itsestäni tuon tumman Mombasa-naisen.”



”Ennen katsoin maailmaa kovin kapeasti...”



”...kunnes FEJO:ssa löysin itsestäni uusia ja rohkeita puolia.”

## Kiinnostuitko? Toimi näin:

**1)** Maksa jäsenmaksu FEJO:n tilille 101130-227446 (Merita).



**”Ennen olin järkevän käytöksen perikuva ja hallitsin itseni...”**



**”...kunnes esperanto ja FEJO tuhosivat suhteellisuudentajuni ja itsehillintäni.”**

**2)** Ilmoita yhteystietosi ja syntymäaikasi FEJO:n sihteerille:
Katja Lampinen, Vaakatie 7 C 30, 00440 Helsinki
(040) 523 6076, *katja.lampinen@edu.stadia.fi*

FEJO:n jäsenmaksu vuonna 2002:
- alle 30-vuotiailta 10 •
- tukijäseniltä 13 •

FEJO:n jäsenenä saat alennusta järjestämiemme tapahtumien hinnoista ja pysyt menossa mukana. Lisäksi varsinaiset jäsenet saavat Esperanto-lehden.

FEJO-membrokotizoj 2002:
- 10 • / membro
- 13 • / subtenanta membro

Kontonumero supre.

## *Mombaso*

Melodio kaj teksto: *Fabio Frizzi*. Originala pecotitolo: *Ibo lele*. Finne prezentis: *Taiska*. Troviĝas i.a en la albumo ”Finnlevy -76”. Esperanta teksto: La mombaso-virinoj de FEJO.

*Mombase mi pasigis tagon nur*
*memore nun Mombaso vivas plu*
*varmon, humidon, mi sentis Mombason,*
*ĉielon, maron, Afrikon.*

*La blua mar' min tuj ravegis*
*kontraŭ koral' la ondoj bruadis*
*Ŝpruco mildiĝis, vian korpon vidis mi*
*ridante albordiĝis vi*

*Kaj koralon, ŝaumblankan konketon*
*etendis vi kun ĉarma rideto*
*tuŝis mi konkon, ĝian blankan surfacon*
*kaj vian korpan humidon*

*Balais nin la vento kiel fajr'*
*vi portis min al ondoplena mar'*
*forta estis vi, en via sino mi,*
*ho, mia salegusta di'!*

*Alvenis nokt', la ondoj mildiĝis*
*kaj al la golf' nur ŝaumo naĝadis*
*sonĝe aŭdiĝis leoparda kri' al mi*
*vekiĝis mi kaj tuŝis vin*

*Mombase mi..*

# Foraj gastoj en Lappeenranta

Dum la somero kaj aŭtuno Lappeenrantan vizitis foraj gastoj. Jen intervjuo de unu el ili, ĉina esploristo Huiyuan Fan.

*Kara Huiyuan, bonvolu rakonti unue al la legantoj, kial vi estas en Lappeenranta.*

– Mi volas labori eksterlande kaj serĉas interrete la profesorojn kiuj esploras en la sama fako kiel mi. Mi trovis unu profesoron en la Teknologia Universitato de Lappeenranta. Li invitis min fari esploradon dum ses monatoj. Oni aranĝis la aferojn kaj tiel mi estas ĉi tie.

*Rakontu pri vi mem kaj via familio.*

– Mi naskiĝis en malgranda vilaĝo, kiu situas proksime al la fama antikva urbo Xi'an. Mi studis kaj laboris en universitato en Xi'an. Mia fako estas teknologia. Antaŭ veni al Lappeenranta mi laboris unu jaron en Hongkongo. Nun mi atendas vizon por Israelo, kie atendas min la posteno de esploristo en la Universitato de Haifa.


Pere de Esperanto mi konatiĝis kun mia edzino. Ni havas unu filon 10-jaran. La edzino kaj filo ankoraŭ loĝas en Xi'an.




***La familio Fan.***

*Kiam kaj kiel vi esperantiĝis?*

– Kiam mi studis en universitato, mi ekkontaktis multajn fremdajn lingvojn. Tiam mi pensis, ke eble ni bezonus iun internacian lingvon, ĉar ni esploristoj dumvive uzas multe da tempo por lerni fremdajn lingvojn anstataŭ lerni en la propra fako. Mi jam intencis krei iun internacian lingvon, sed hazarde mi konatiĝis kun iu esperantisto kaj mi konstatis, ke Esperanto ĝuste estas la lingvo, kian mi pensis. Tiu esperantisto samtempe estis organizanta Esperantokurson. Mi partoprenis la kurson kaj eklernis Esperanton. Tio okazis en 1981.



***Huiyuan Fan.***

Ekde tiam mi ofte partoprenis E-aktivadojn, ekzemple la 71-an UK:n en Pekino.

*Ĉu Esperanto helpis vin en Finnlando?*

– Kompreneble Esperanto helpis min! Kiam mi planis la vojaĝon al Finnlando, mi trovis interrete kelkajn finnajn esperantistojn, el kiuj prof. Jouko Lindstedt estas menciinda. Li varme prezentis kelkajn lappeenrantajn esperantistojn, kiuj poste donis al mi tre gravan helpon.

*Vi ja partoprenis Aŭtunajn Tagojn de EAF. Kiajn impresojn vi ricevis tie?*

– Mi sentas, ke tiu evento estis sufiĉe internacia. Mi povis konatiĝi krom finnaj kun pluraj alilandaj esperantistoj. Due, surprizo al mi estis, ke tiom da finnaj esperantistoj parolas vere bonan Esperanton.

*Kiel fartas nune Esperanto-movado en Ĉinio?*

– Mi kredas, ke ĉina Esperanto-movado iras kune kun E-movado ĉie tra la mondo; antaŭ kelkaj jaroj tie estis ”alta ondo”. Estas tamen bone, ke ni en Ĉinio povas vidi gejunulojn, kiuj vigle okupas pri Esperanto, pli kompare kun eŭropaj landoj. Ĉina Esperanta Ligo oficiale petis UEA:n ke la UK en 2004 okazu en Pekino.

*Rakontu pri viaj plej gravaj impresoj pri Finnlando kaj finnoj.*

– Mi ne vidis multajn homojn ĉi tie; estis mia unua impreso. Sed ĉi tie estas multe da arbaroj. Strangaj al mi en julio estis tiuj sennoktaj noktoj! Ankaŭ mia familio, kiu dum aŭgusto restis en Finnlando ĉe mi, ŝatas vian landon.

*Mi dankas vin pro la intervjuo kaj deziras al vi ĉion bonan kaj sukceson “en via mondvagado”, kaj bonvenon denove al Finnlando! Ĉu vi venos?*

– Jes, kompreneble!

*La intervjuon faris*
*Jorma Toropainen*

Ĉi tiu kanto gajnis la unuan premion en la Belartaj konkursoj de UEA 2001. Pliaj kantoj de Anja Karkiainen kaj Vesa Pölkki troveblas ĉe: <*http://koti.mbnet.fi/vesasarj/tuotanto/anjavesa.html*>.

# Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Ilkka Santtilalle, Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki, s-posti *ilkka.santtila@esperanto.fi* mieluummin kirjallisena.**

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Terttu Tyynelä) PL 136, 40101 Jyväskylä
- Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. martti.pennanen@pp.phnet.fi
- Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkeli, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkeli.
- Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- Salossa: Salon Esperantoseura / Esperanto-klubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla matti.wallius@pp.inet.fi
- Tampereella: Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Rainer Arvola, Käräjätörmä 2 E 32, 33310 Tampere, andromeda @koti.tpo.fi)
- Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi
- Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan “esperantoryhmä”, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- Suomen opettajain esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi. Tilinro: 101130-227446
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan “Esperanto” kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

**ESPERANTOLEHTI**

**ilmestyy vuonna aperas dum la jaro** **2002**

| Nro | Red.grupo komencas | Limdato | Aperas |
|---|---|---|---|
| 3 | 1.5 | 15.5 | 1.6 |
| 4 | 1.7 | 15.7 | 1.8 |
| 5 | 1.9 | 15.9 | 1.10 |
| 6 | 1.11 | 15.11 | 1.12 |

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

## Ilmoitushinnat

| Ulkopuoliset mainostajat: | Jäsenet: |
|---|---|
| 1/1 sivu 600 mk | 1/1 sivu 300 mk |
| 1/2 sivua 400 mk | 1/2 sivua 200 mk |
| 1/4 sivua 250 mk | 1/4 sivua 125 mk |

-----------------

# 2

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy kesäkuun alussa. Jutut 15.5.2002 mennessä Anna Ritamäelle. Venonta numero aperos en la komenco de junio. Artikoloj ĝis 15.5.2002 al Anna Ritamäki. Osoite/adreso: Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito, puh/tel. (02) 423 146, s-posti/rete: <*esperantolehti@esperanto.fi*>.

**Pica-Paino Oy, Jyväskylä 2002**